

*Esperanto en servo de la monda paco*



# PAÇO

Oficiala organo de Mondpaca Esperantista Movado (MEM)



**ROMESH  
CHANDRA  
PAROLAS  
EN SOFIA**

**4**  
**80**



# je vigla posteno

Kun grandega atento oni observas la eksteran politikon de la gvidanta imperiisma lando — Usono. Tiu politiko estas stranga kaj en plej supera grado neantaŭvidebla. Ĝi faras zigzagojn, flankeniĝojn, nekklarajn rekonon de konsumitaj eraroj — hodiaŭ rekonataj por esti morgaŭ reĵutataj. Tio jam estiĝis „stilo“ de la usona „administracio“ kaj ne plu faras impreson. Sed la obstinaj klopodoj pliintensigi la streĉecon en la mondo kaj precipe certaj antaŭzorgoj de militagresa karaktero provokas facile kompreneblan alarmon. Ja en la aktualaj cirkonstancoj estas klare al ĉiu kien povas konduki tiu ĉi tre danĝera direkto en la ekstera politiko de Usono.

Tamen la minaco, kiun la administracio de Karter intence plivarmigas en la internaciaj rilatoj, jam produktas neatenditan por siaj aŭtoroj rezulton. Ilia tromemfida maldeziro aprezi la internacian situacion, kiun memfidon ili deziras prezenti kiel esprimon de decidemo kaj forto,



Carter glaciigas la kontrakton SALT 2 kaj revivigas la malvarman militon (The cold war)

nun ĉiam pli ofte estas taksata fare de usonaj kaj aliancanaj politikistoj kiel simplan malkapablon vidi la realaĵon tia, kia ĝi fakte ekzistas, kaj konsideri ĝin en la ekstera politiko de Usono. Alarmitaj de tiu manko de klarvideco, kiu povus doni fatalajn rezultojn, sobraj voĉoj en Usono kaj en okcidentaj landoj avertas, ke „la Tero ne turniĝadas ĉirkaŭ Vaŝingtono“. Sufiĉas nur citi eron el la artikolo de la konata usona politikisto-William Fulbright, eksprezidanto de la Ekstera komisiono de la Usona Kongreso, en „New York Times“:

„Post la Dua Mondmilito Usono prenis sur sin ne-laŭfortan mision, bazante sin sur la danĝera iluzio, ke ĝiaj monrimedoj estas neelĉerpeblaj kaj ke la sorto destinis ilin gvidi la mondon... Ni ne komprenas bone nian rolon en la internaciaj rilatoj. Ni estas sklavoj kaj al niaj antipatioj, kaj al niaj simpatioj. Okulvideble — ni ne havas ideon pri la interesoj de nia propra lando.

Samtempe jam pli ol ses jardekojn ne ĉesas la trompado de la popolamasoj fare de la imperiista propagando pri ia „minaco el Sovetunio“. Sed la faktoj pruvas, ke la reala minaco devenas el la senbrida vetarmado de la imperiismo gajni avancon en la sinarmado kaj provi denove realigi la malnovajn agresajn planojn de Usono. La malkaŝa pretendo de Usono pri gvida rolo en la tuta mondo puŝas ĝin al produktado kaj instalado de novaj kaj novaj armiloj kaj arsenaloj en ĉiuj teranguloj, al kreado de miloj da bazoj por la Pentagono.

Jen la vera minaco por la vivinteresoj de la tuta homaro, tiu ĉi minaco subfosas la plej superan rajton de la homo — vivi en paco kaj plian ŝojon manifestas la senrespondecan kaj arogantan agadmanieron de la usona registaro, kiu daŭrigas sian linion kontraŭ la sereniĝon, kontraŭ la interesojn de ĉiuj popoloj, inkluzive la usonan. Tial ĉiam pli kaj pli klare kaj insiste sonas la voĉo de la pacobatalantoj: konservi la pacon de la reala minaco eliranta el la imperiismo de Usono kaj ties aliancanoj. Tio unuigas ĉiujn homojn kun bona volo. Pri tio insistas la usonaj medicinaj scienculoj, kiuj apelaciis al kontraŭstaro kontraŭ la nuklea katastrofo.

MEM-anoj subtenas tiun pozicion, kiu unuigas la bonvolemajn homojn el ĉiuj teranguloj.

N. Aleksiev



# EEK KAJ HINDOCINIO

Alf Lomas

Eŭroparlamentano por Nord-Orienta Londono

Cu EEK (Eŭropa Ekonomia Komunumo) estas sincera kiam ĝi diras, ke ĝi volas helpi la popolojn de Hindo-Ĉinio? Ĝis nun ne estas evidente. Ĝi proksimiĝas al Ĉinio pro la kontraŭvjetnama kaj kontraŭsoveta pozicio de Ĉinio kaj aliĝas al la internacia kampanjo por kalumnii Vjetnamion. Ĝi ĉesigis ĉiun nutrohelpon por la Vjetnama popolo. La decido ĉesigi ĉiun helpon al Vjetnamio fariĝis en julio 1979 kaj subteniĝis de la Konsilantaro de la Ministroj.

Tiu decido fariĝis ŝajne pro la malfeliĉa stato de la „Boatanoj“, sed vere estis venĝo kontraŭ Vjetnamio pro ĝia venko super Usono kaj ĝiaj aliancanoj.

La sinteno de EEK al Vjetnamio klariĝis dum la debatoj en la Eŭropa Parlamento. Kiam la komisiono decidis ĉesigi ĉiun nutrohelpon, ni prezentis proponon, kiun la Socialista Grupo subtenis. Ĝi postulis, ke la Komisiono rekomencu plenumi la programon de nutrohelpo al Vjetnamio. Ni diris, ke estas malprave koncentri la helpon, kvankam ĝi estas malgranda, sur la „Boatanoj“, dum oni rifuzis ĝin al Vjetnamoj, kiuj restis en sia hejmlando. Ni atentigis, ke ili ĉesigas la helpon al popolo, kiu suferis eble pli ol alia popolo dum la nuna epoko, sed reduktis siajn porciojn por helpi siajn kampuĉiajn najbarojn.

La komisiono respondis, ke ili rekonsiderus la decidon post kiam ili vidos la progreson faritan al pli laŭorda elmigro de rifuĝintoj, sed, kvankam la elmigroj nun estas reguligataj kaj la amaseligado instigata de la ĉinoj ĉesis, EEK ankoraŭ rifuzas rekomenci la plenumadon de la programo de nutrohelpo. Ili nun uzas la fikcion ke la vjetnamoj estas respondecaj pro nunaj problemoj de Kampuĉio. Al tiu fikcio resonas la dekstra plimulto en la Eŭropa parlamento kaj eĉ, malfeliĉe, la italaj membroj de la socialista grupo. Oni diras, ke la unua viktimo de la milito estas la vero: tio tute validas por la konflikto en Kampuĉio. Tute ignorante la bruatan tumulton, la vjetnamoj helpis la kampuĉianojn renversi la sangon kaj kruelan reĝimon, kvankam ili havas multajn internajn problemojn. La vjetnamoj ĉesigis la genocidon en Kampuĉio per interveno bonvenigita de la plimulto da kampuĉianoj.

La EEK ŝajnas deziri daŭrigi la militon perditan de Usono kaj malsukcesos simile al usonanoj. La vjetnamoj venkos ĉiujn malfacilojn kaj rekonstruos sian landon kun aŭ sen la helpo de EEK.

La EEK ne estas nur kontraŭ Vjetnamio: ĝi ne havas entuziasmon helpi Kampuĉion. Post premo de la ĝenerala sekretario de UN, oni konsentis doni 25 milionojn de EVA (ĉirkaŭ 16 milionojn da pundoj sterlingaj) al Kampuĉio kaj la rifuĝintoj al Tajlando. La tuta EEK buĝeto estas 8.000 milionoj da pundoj sterlingaj. 20 milionoj EVA estas asignataj al Ruĝa Kruco kaj UNICEF. La restantaj 5 milionoj EVA financos la provizon de nutrohelpo en formo de 20.000 tunoj da rizo. Aldone, la Konsilantaro akceptis sugeston de la komisiono provizi 1500 tunojn da senkrema lakta pulvoro. Tamen, konsento sur papero estas unu afero, kaj sendi la helpon estas tute malsama. La EEK estas ĉiam malrapida efektiviĝi sian helpoprogramon kaj ĝis nun ne multa helpo atingas Kampuĉion. Pro tio EEK kulpigas Vjetnamion.

Malgraŭ la aŭtoritataj raportoj de multaj agentoj kaj de UN, ke vjetnamoj tute kunlaboras, la EEK asertas, ke la helpodistribuo estas malhelpata de Vjetnamio kaj de Pnompeno. La prezidanto de la Konsilantaro de Ministroj ripetis tion dum diskuto kun la Komitato pri Politikaj Aferoj de la Eŭropa parlamento.

Estos pli kaj pli malfacile pravigi la nunan malamikan sintenon de la EEK, kiam helpo de Sovetunio kaj la socialismaj landoj kreskas. La EEK estas jam kritikata de la maldekstraj socialistaj kaj komunistaj membroj de la Eŭropa Parlamento pro ĝia malhumana sinteno al Hindoĉina popolo.

Estas nedefendeble, ke la EEK, kiu havas montojn da plusa nutro, preferas fari tiun nutron nemangebla ol sendi ĝin al longesuferranta popolo de Hindoĉinio

Tradukis S. Beer (El „Labour Monthly“—Britio)



Ju pli ni armas nin, des pli ni povas paroli pri malarmado





Bulgario

## DEKLARO

Amasa kunveno, okazanta la 23-an de aprilo 1980 en Sofio, en kiu partoprenas esperantistoj el Bulgario, ĈSSR, GDR, Hungario, Pollando, USSR kaj Vjetnamio, kun granda maltrankvilo konstatas la plifortigon de la politika streĉo en la mondo. La imperiistaj fortoj kaj precipe Usono kaj NATO iniciatis la reokazigon de malvarma milito, kiu alprenis neatingitan antaŭe amplekson. Usono uzas bojkotojn kaj aliajn formojn de ĉantaĝoj.

La Blanka Domo malkaŝe prenis kurson de plifortigo de vetarmado, kies celo estas renversi la ekzistantan ekvilibron de militfortoj por povi rilati al Sovetunio kaj la aliaj socialismaj landoj el pozicio de forto. La usona registaro malkaŝe deklaris la intencon interveni en internajn aferojn de evoluantaj landoj, kiuj ne deziras plu toleri la novkoloniisman ekspluatadon. Usono bremsas la justan solvon de la konflikto en Proksima Oriento, estigas novajn militbazojn en la regiono de la Persa golfo kaj minacas Iranon per militoperacioj.

Ni kategorie kondamnas tiujn danĝerajn por la homaro agojn. Ni — fidelaj al la principoj de la paca kunekzisto, difinitaj unue de Lenin, kies 110-an naskiĝdatrevenon solenas nun la tuta progresema mondo — apelacias al la tutmonda esperantistaro firme batali kontraŭ la aspiroj de la imperiistoj eksplodigi novan mondmiliton, ni apelacias por plifirmigo de la paco sur la tero.

ĈSSR

### I-a RENKONTIGO DE PACDEFENDANTOJ EN PARDUBICE

La 15-an de marto 1980 Esperanto-klubo ĉe Kulturdomo Dukla aranĝis la II-an renkontigon de pacdefendantoj. Krom aliaj gastoj ĉe estis la prezidanto de MEM d-ro Imre Pethes el Budapeŝto, membro de Centra Laborrondo de GDR Helmut Fuchs kaj la prezidanto de la ĉeĥa sekcio de MEM Drahomir Kočvara.

Delegacio de esperantistoj estis akceptita de la urbestro Jaroslav Šimon en la historia salono de la urbodomo. La delegacio poste forveturis al Zámeček por meti florojn al memorŝtono pri viktimoj de faŝisma okupado.

Dum kunsido de la pacdefendantoj parolis Kočvara pri la historio de MEM, pri ĝiaj taskoj, pri patroneco super unu lernejo en Hanojo,

pri japana libro Hiroŝima—Nagasaki kaj pri eldonita libro de Julius Fučík „Raportaĵo skribita en pendumila maŝo“.

D-ro Imre Pethes parolis pri la streĉita mondsituacio. Celoj de Esperanto-movado ne estas nur lingvaj aferoj, sed ankaŭ kaj precipe ideaj. Esperanto estas firme kunligita kun pacideoj kaj kun internacia amikeco.

Helmut Fuchs substrekis en sia parolado la hodiaŭan mondsituacion, montris kiel danĝera ĝi estas. NATO, instigata de usona prezidanto Karter preparas atakemon por nova mondmilito.

Inĝeniero Horák parolis pri falsaj informoj, kiuj en kapitalismaj landoj cirkulas pri socialismaj landoj kaj diris: „Se vi, esperantistoj, per via hobbio, pere de Esperanto konvinkos almenaŭ unu familion en Okcidento, tiam vi faros grandan politikan humanan laboron.“

Fine de la packonferenco estis aprobita rezolucio, kiu estis dissendita al ĉiuj Esperanto Asocioj, precipe en kapitalismaj landoj.

## REZOLUCIO

La partoprenantoj de 11-a Renkontiĝo de Pacdefendantoj, okazanta la 15-an de marto 1980 en Pardubice, pritaksis la nuntempan danĝeran politikan situacion en la mondo kaj plene subtenas la rajton de homo je mondo sen militoj, ĉar tia mondo respondas al la intereso kaj vivbezonoj de ĉiuj nacioj kaj de ĉiuj landoj.

La partoprenantoj rifuzas la alvokon de prezidanto de USONO Karter kaj lian bojkotadon de la someraj olimpikaj ludoj, kiuj devas antaŭ ĉio helpi al pliproksimiĝo de la nacioj.

Ili plene kondamnas la decidon disloki novajn usonajn raketojn de meza flugpovo en okcidenta Eŭropo kaj kontraŭstaras la militan doktrinon de histeria kaj febra sinarmado.

La partoprenantoj de la renkontiĝo konstatas, ke:

- la postulo konservi la pacon havas tutmondan karakteron kaj la internacia paca movado havas nuntempe nekompareble pli firmajn poziciojn ol en la estinteco;
- ekzistas fortoj, kiuj klopodas gajni la regadon super la tuta mondo kaj por tiu celo elspezas grandegajn financajn rimedojn, kiuj povus esti uzitaj por forigo de homa mizero kaj subpremado;
- por certigo de paco, plifirmigo de sekureco inter la nacioj kaj haltigo de febra armado estas nia devo gvidi konstantan batalon.

Tiukaŭze la partoprenantoj de la renkontiĝo aivokas al ĉiuj esperantistaj organizaĵoj de la mondo, al ĉiuj iliaj membroj, ke ili plene uzu Esperanton tiel, kiel estis destinita de ĝia iniciatinto d-ro L. L. Zamenhof, al interkompreniĝo inter nacioj kaj sekve de tio al batalo por certigo de la monda paco, firmigo de la sekureco inter nacioj kaj haltigo de febra armado. Kontraŭ la doktrino de la milita histerio starigu



ta doktrinon de konsekvenca batalo por paco kaj sekureco en la mondo.

Sekve de tio ni alvokas plene subteni kaj plifirmigi poziciojn de forto, progreso kaj paco en la mondo, plilarĝigi niajn vicojn, fundigi kaj perfektivigi la interŝanĝon de informoj kaj serĉi novajn vojojn kaj eblecojn de reciprokaj renkontiĝoj kaj per tio kontribui al vera proksimiĝo kaj interkompreno inter la nacioj. Per niaj eblecoj ni kontraŭstaru al tiuj fortoj, kiuj proprigas al si la rajton artefarite fremdigi la naciojn kaj vekti novajn malamikecojn.

Ni, partoprenantoj de la hodiaŭa paca renkontiĝo, alvokas la tutmondan esperantistaron, ke ĝi staru kontraŭ ĉiu, kiu povus malsukcesigi la realigon de tiuj streboj.

Partoprenantoj de 11-a Paca Renkontiĝo en Pardubice

## USSR

### PORPACA EKSPozICIO DENOVE EN SAMARKANDO

La 28-an de februaro en luksa salonego de la Stata muzeo pri historio de arto kaj kulturo de la Uzbeka SSR en urbo Samarkando okazis solena inaŭguro de porpaca ekspozicio sub la devizo „Ni bezonas pacon!“, dediĉita al la glora 110-a datreveno de la naskiĝo de V. I. Lenin. Same kiel pasintjare la ekspozicion organizis Samarkanda Esperanto-Klubo de Interpopola Amikeco kunlabore kun la regiona filio de



La organizantoj de la ekspozicio  
La unua maldekstre k-do V. R. Lemelev

### KOMUNIKAĴO PRI LA 13-A KONSULTIĜO

De la 18-a ĝis la 23-a de aprilo 1980 en Sofio, Bulgario, okazis la 13-a Konsultiĝo de Esperanto-organizaĵoj el socialismaj landoj. La Konsultiĝon, kiu pasis sub la signo de la 110-a datreveno de la naskiĝtago de V. I. Lenin, partoprenis reprezentantoj de jenaj organizaĵoj: Asocio de Esperantistoj en Slovaka Socialisma Respubliko, Asocio de Sovetaj Esperantistoj, Bulgara Esperantista Asocio, Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo de GDR, Ĉeĥia Esperanto-Asocio, Pola Esperanto-Asocio, Hungara Esperanto-Asocio kaj Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio.



En la ekspoziciejo

Uzbeka Amikeca Asocio. Salutelpaŝis la scienca vicdirektoro de la muzeo M. H. Urmanova, respondeca sekretario de la regiona filio de Uzbeka Amikeca Asocio M. V. Muminova, estrarano de Samarkanda Esperanto-Klubo de Interpopola Amikeco kaj kandidato de medicinaj sciencoj V. R. Lemelev. Post tio alta funkciulo de la regiona partia komitato U. S. Turunov tranĉis la rubandon kaj deklaris la ekspozicion inaŭgurita. La ekspozicio estis ampleksa: estis eksponitaj diverslandaj porpacaj afiŝoj, flugfolioj, infandeseĝnaĵoj, libroj, revuoj, glumarkoj, insignoj, poŝtmarkoj, gasbalonetoj k. a. pacpropagandiloj. Aparte menciindas la hele ornamitaj folioj kun pli ol 10.000 protestsubskriboj kontraŭ la neŭtrona bombo kolektitaj de s-anino Lenke Dombovari, membro de socialisma brigado de frizistoj el urbo Kalocsa (Hungario). Speciala elmontrotabulo temis pri la porpaca agado de MEM kaj pri la kreskantarolo de esperantistoj en la monda pacbatalo. La ekspozicion multnombre vizitis ankaŭ eksterlandaj turistoj (i. a. el Vjetnamio, Pollando k. a.). La ekspozicio funkciis dum unu monato. Pri la evento raportis gazetaro, radio kaj televido, aperis specialaj afiŝoj (en la uzbeka kaj rusa lingvoj) kaj invitiloj. En proksima tempo la ekspozicio vizitos Taŝkenton, eventuale ankaŭ aliajn urbojn de USSR.

Anatolo Ionesov

La partoprenintaj delegitaroj traktis komun interesajn problemojn de la internacia Esperanto-movado, interŝanĝis spertojn kaj informojn pri la kunlaboro inter siaj landaj organizaĵoj, aparte substrekante la rolon de Esperanto en la internacia pacbatalo. Oni plue akcentis la neceson de sistema edukado kaj kvalifikado de esperantistaj aktivuloj, la esploron de la sciencaj aspektoj de Esperanto kaj la aplikon de la Internacia Lingvo por scienco kaj tekniko. La delegitoj interkonsentis pri aktivecoj rilatantaj la celebradon de la 1300-jara jubileo de la Bulgara Ŝtato en 1981.

La Konsultiĝo notis sian maltrankviliĝon pri la akriĝo de la internaciaj rilatoj. Oni esprimis



sian esperon, ke la tutmonda esperantistaro ne allasos negativajn sekvojn de tiu akriĝo.

La partoprenintaj organizaĵoj emfazis sian pretecon ĉion fari por harmonia pluevoluigado de la internacia esperanto-movado, substrekte, ke necesas reciproka respekto de la intereso, vidpunktoj kaj enlandaj labormetodoj.

La Konsultiĝo akceptis rezolucion solidare al la popoloj kaj la esperantistoj de Vjetnamio, Laoso kaj Kampuĉio.

Al Bulgara Esperanto-Asocio la partoprenintaj delegitoj esprimis sian dankon pro la bonegaj laborkondiĉoj, kiuj ebligis intensajn kaj rezultodonajn traktadojn.

Sofio, 23. 04. 1980.

## REZOLUCIO PRI SOLIDARECO

Konsiderante la ekstreme streĉan situacion, kiu kreiĝis en Hindoĉinio kaŭze de la grandpotenca ekspansiisma kaj hegemoniisma politiko de Pekino, politiko konscie enkuraĝigata de Vaŝingtono kaj de aliaj internaciaj reakciaj fortoj;

Farante konsekvencajn konkludojn el la lasta agresmilito kondukita de la ĉinaj trupoj kontraŭ Vjetnama Socialisma Respubliko de la 17-a de februaro ĝis la 16-a de marto 1979, kaj decidante kontraŭstari al ĉiuj maljustaj perfortaj agoj kune kun ĉiuj porpacaj kaj progresemaj fortoj;

Dezirante helpi al la popoloj de Vjetnama Socialisma Respubliko, Laoso kaj Kampuĉio defendi sian nacian sendependecon, konstrui socialismon kaj disvolvi E-movadon en la paco kaj la internacia kunlaboro;

Ni, la partoprenantoj de la 13-a Konsultiĝo de Esperanto-organizaĵoj de socialismaj landoj okazanta en Sofio je la 19—24 a de aprilo 1980 unuanime:

1. manifestas nian fratan subtenon al la popoloj de Vjetnama Socialisma Respubliko, Laoso kaj Kampuĉio kaj nian volon kontribui al la disvastiĝo de la internacia lingvo en tiuj ĉi landoj;
2. fondas solidarec-komisionon kun la popoloj kaj la esperantistaro de Vjetnama Socialisma Respubliko, Laosa Popoldemokratia Respubliko kaj Kampuĉia Popola Respubliko konsistantan el la jenaj personoj;

1. D. Haĝiev — BEA (*prezidanto*)
2. R. Hahlbohm — CLE (*vicprezidanto*)
3. D. Perevalov — ASE (*vicprezidanto*)
4. L. Kosieniak — PEA
5. D. Koĉvara — ĈEA
6. Eva Farkas — HEA
7. A. Lukaĉ — AESSR;

3. alvokas ĉiujn Esperanto-organizaĵojn en la socialismaj landoj kaj en la tuta mondo, laŭ siaj eblecoj liveri adekvatan helpon, kaj moralan kaj materialan, al la esperantistaj movadoj de Vjetnama Socialisma Respubliko, Laosa Popoldemokratia Respubliko kaj Kampuĉia Popola Respubliko.

Sofio, la 21an de aprilo 1980

## BULGARA PACKONGRESO

Partoprenis ankaŭ s-ro Romeŝ Ĉandra

La kongreso okazis meze de la jam pasinta printempo. Pro la specifa apermaniero de nia organo „PACO“ estis maleble fari pli frue informartikolon pri ĝi.

La kongreso prezentis grandan landan pacmanifestiĝon, kiun ĉeestis ne nur reprezentantoj de ĉiuj tavoloj de la bulgara socio, sed ankaŭ delegitoj el la packomitatoj de multe da aliaj landoj kaj notinde — de balkanlandoj.

La malferman paroladon faris nia fama samideano akademiano prof. Georgi Naĝakov, tiu sama, kiu faris salutparoladon antaŭ la Tria Generala Konferenco de MEM en Sofio en 1963. Akad. Naĝakov estas honora prezidanto de la Monda Packonsilio (MPK) kaj de la Bulgara Nacia Packomitato.

La kongreso indas specialan atenton ankaŭ pro tio, ke en ĝia laboro partoprenis delegitaro de MPK ĉekape kun ĝia prezidanto s-ro Romeŝ Ĉandra. Li parolis pri la laboro farenda lige kun la antaŭstaranta en proksima septembro monda packongreso en Sofio „Parlamento de la Popoloj por Paco“.

Estas konate, ke la malamikoj de la paco faras ĉion eblan por revenigi la periodon de „malvarma milito“. La usona prezidento okupiĝis kun energio, inda por noblaj celoj, dikti al la usona popolo kaj al la aliancanaj registaroj esti pretaj por novaj militaventuroj por likvido de la sereniĝo kaj ĝiaj ĝisnunaj rezultoj post la tuteŭropa konferenco en Helsinki (1975). La lecionoj de la pasinteco pruvis la fiaskon de la tiama „malvarma milito“, sed evidente ekzistas politikistoj malkapablaj realisme kaj sobre pritaksi la faktojn. Malgraŭ ĉiuj klopodoj de la usona kaj la monda imperiisma reakcio, la periodo de „malvarma milito“ estis anstataŭita per periodo de sufiĉe sentebla sereniĝo, kiu faris ebla la kunvokon de la Helsinkia konferenco en 1975 kun la partopreno de ĉiuj eŭropaj registaroj kaj tiuj de Kanado kaj Usono, rekte interesataj pri la stato en Eŭropo. La unuanime subskribita tiam Fina Akto prezentas bonegan programon por plua profundigo de la sereniĝo kaj ties vastigo ankaŭ en la militan sferon, kio estis brile manifestita ankaŭ per la subskribo de SALT-2 en Vieno la pasintan jaron fare de usona prezidento Karter kaj sovetia prezidento Breĵnev. Kaj la tute neadekvata nuna pozicio de Usono rilate tiun dokumenton kaj entute al la sereniĝo montras, ke bedaŭrinde ne malaperis en la mondo adeptoj de nova eldono de la „malvarma milito“. En 1978 kaj 1979 aprobitaj NATO-planoj por instalado de novtipaj strategiaj nukleoraketoj en Okcidenta Eŭropo ne povas ne maltrankviligi la pacaman publikan opinionon.

La parolado de s-ro Ĉandra antaŭ la bulgara packongreso prezentas kompletan praktikan pro-



# Letero al virinoj

Kara Amikino,

Ĉu vi pensis iam pri la kialo de nia vivo? Al kio celas nia dumviva laboro? Ĉu vi konsentos, ke ni volas prepari ĉion plej bonan pro niaj posteuloj? Ne nur por niaj familianoj, sed por la granda tutmonda familio, por ĝenerala kontenteco, amikeco, amo kaj por la tutmonda paco. Jes, por paco, ĉar ni ĉiuj ja scias, ke por vivo, amo, por kontenteco, por nia laboro necesas unuavice fari ĉion por defendi kaj konservi la pacon, ĉesigi produktadon de armiloj, haltigi superregadon de unu nacio super alia. Ja ni ĉiuj deziras pacan kunvivadon, reciprokan komprenon inter la popoloj. Aldonu ankaŭ ni — virinoj — nian ŝtonon al la konstruado de la mondo sen militoj, sen mizero — ne sufiĉas nur revii pri la paco!

Nia kara internacia lingvo ESPERANTO povas helpi al la interkompreniĝo de diverslingve parolantaj popoloj. Ni esperantistinoj havas jam spertojn kiel diri unu al la alia la veron, ni estas kapablaj paroli pri ĉio — pri ĉio bela, interesa, pri ĉio, kio nin kunligas, kio nin povus unuigi, sed ankaŭ pri ĉio, kio estas malagrabla, kio nin turmentas kaj maltrankviligas.

Se ni, almenaŭ helpe de korespondado, amikiĝos, certe neniam poste ni volos batali unu kontraŭ la alian. Geamikoj tamen ne bezonas armilojn, ĉar ili daŭre volas vivi en amikeco, kontenteco kaj volas sin reciproke helpadi.

Plivastigu ni, virinoj el diversaj landoj, reciprokan amikecon, promesu pli viglan agadon,

gramon por plua energia kaj organizita laboro por bonega preparo kaj brila realigo de la „Parlamento de la Popoloj por Paco“. Ankaŭ la esperantistaro povas tiri gravajn konkludojn el tiu parolado.

Mondpaca Esperantista Movado partoprenos tiun Parlamenton kaj manifestos sian apartenon al ĉiuj pacfortoj en la mondo, kiuj praktike aktivas en la pacbatalo. La progresema esperantistaro kontribuos laŭ siaj ebloj por la realigo de tiu plej grava humanisma tasko de nia epoko — la malebligo de nova nuklea milito, kiu kapablas ruinigi la tutan mondon. Tiu ĉefa tasko de la progresema homaro tiel bone

informadu nin per korespondado, kion ni povus fari en nia lando por defendi la pacon. Skribu unu al alia ankaŭ pri niaj ĉiutagaj sukcesoj en laboro, en nia familia rondo, serĉu ĉe la aliaj konsilojn kaj konsolojn, disdonu konsilojn, spertojn, ridetojn, sciigu al ceteraj ankaŭ la malsukcesojn — ili povus servi kiel ekzemploj. Ni ĉiuj aŭ mem aŭ per diversstupa helpo edukis, edukas kaj edukos infanojn, junularon, ni kuiras, ni fotografas, mastrumadas, zorgas pri ĝardeno, vestado, interesiĝas pri muziko, sporto, teatraĵoj; ni havas multe da hobiaj, ankaŭ devoj — do oni vidas, ke ĉio povas esti nia komuna punkto de amikeco.

## KAJ ĈIU AMIKA KONTAKTO POVAS ESTI KOMENCO DE BATALO KONTRAŬ MILITO!

La VIII-a Konferenco de MEM en Varna elektis novan Internacian Komitaton kaj novajn gvidantojn de la komisionoj, inter ili ankaŭ de la virina. Ĝiaj celoj estas:

- instigi la esperantistinojn komune batali por paco;
- instigi la landajn sekciojn de MEM elekti virinon, aŭ se eble virinan komitaton, kiu kunlaborus kun la virina komisiono de MEM;
- okazigi kontaktojn kaj kunlaboradon kun virinoj internacie kaj kun porpacaj organizaĵoj kaj ties landaj sekcioj;
- organizi internaciajn kontaktojn kaj renkontojn inter virinoj.

Gvidantino de la Virina Komisiono de MEM estas Maria TURKOVA, Vrchlického 7, 320 29 PLZEN, Ĉeĥoslovakio.

Fariĝu ankaŭ vi nia kara amikino-pacdefendantino, aliĝu al la komisiono de virinoj ĉe MEM. Serĉu en via lando, en via urbo aŭ ĉirkaŭaĵo ceterajn virinojn por porpaca laboro!

Skribu rekte al s-anino Turkova, se vi mem aŭ alia virino el via lando volus kunlabori. Skribu pri tiu ĉi afero, oni atendas vian respondon, skribu ankaŭ al ceteraj viaj amikinoj pri tio.

respondas al la streboj kaj la intereso de la monda esperantistaro, ke tiu ĉi lasta ne povas ne simpatii kun ĝi.

La popoloj konservu la pacon kaj la vivon sur nia planedo, malebligu la novan vetarmadon, forĵetu la uzon de forto en la internaciaj rilatoj!

Por malarmado, por plua sereniĝo, por sekureco kaj kunlaborado!

Al brila sukceso de la Parlamento de la Popoloj por Paco!

Nikola Aleksiev,

honora prezidanto de MEM  
membro de Monda Pacokonsilio  
kaj de Bulgara Pacokomitato



# Mia julio

Jerzy Grum

Tondris. Sed tio ne estis tempesto. Eble, se oni uzus la banalan formulon, tempestis la historio, blovis ĝia vento. Tion mi tamen ankoraŭ ne komprenis, kvankam subkonscie mi sentis, ke io grava estas okazonta.

Ĉirkaŭe ondis spikaro sur la kampoj. Tiel var me estis, ke eĉ ni infanoj, kutimaj fari plej neimageblajn petolaĵojn, serĉis protektan omb-ron ĉe proksimaj salikoj. Kaj ĝuste tiam, de tre malproksime, denove aŭdiĝis obtuzaj tondroj. Jen kaj jen. Sed la ĉielo estis tute sennuba. Kaj tion ni ne komprenis.

Malfrue posttagmeze, ni jam avide fortrinkis po kelkajn glasojn da acida lakto kaj forman-ĝis kelkajn tranĉojn de tiu unike bongusta vilaĝa pano de propra bako, kiam iu frapetis ĉe la pordo. Panjo, iel ekscitita de la mateno, iris por malfermi. Ni rigardis scivole, kiu povas viziti nin en la kabano, situanta iom for de la vilaĝgrando, kie ni somerumis en tiu 1944-a jaro. Panjo malfermis la pordon kaj antaŭ la sojlo ni vidis soldaton. Tion ni konjektis laŭ la karabeno, kiun li tenis kaj laŭ lia bekĉapo. Ĝis tiam la soldatoj ĉiam vekis ĉe ni timon. Ja ĝuste soldatoj kaŭzis, ke nia patro estis ie for, kvankam ni sciis, ke li vivas. Tion diris panjo.

Sed nenion pli. Ĝuste la soldatoj estis krientaj, puŝetantaj homojn. Ĝuste ilia raŭka parolo kaŭzis, ke ni prefere evitadis ilin, eĉ se foje la infana scivolemo venkis.

Nun okazis tamen io alia. Panjo ekkriis ĝoje, ĉirkaŭbrakis la soldaton, en ŝiaj okuloj aperis larmoj kaj ŝi diris: „La niaj“. La soldato poste proksimiĝis al ni, karese tuŝis niajn harojn kaj diris: „Nu, infanetoj, nun estos al vi pli bone. Nun Pollando estos libera.“ Kaj al panjo li demandis: „Ĉu germanoj aperis dum la tago?“ Panjo neis. La soldato ankoraŭ ekrigardis al ni ĉiuj kaj, gestinte adiaŭe per la mano, eliris. Ĝuste tiam ni ankoraŭ rimarkis sur la maniko de lia ĉemizo blank-ruĝan rubandon. Poste panjo longe klarigis al ni, kion signifas tiu rubando, kial la soldato ne havis uniformon kaj ke proksimiĝas iu „fronto“. Dume la fronto estis nur tiuj tondroj malproksimaj.

La sekvan matenon sur proksima vojo aperis neatendite taĉmento de germana kavalerio. Ni vidis, kiel ili rapide galopas, ne haltante kaj sen la kutima kriado. Ili malaperis same rapide, kiel ili aperis. Kaj la tondroj estis pli kaj pli laŭtaj, kvankam daŭre nur opaj nubetoj rampis sur la ĉielo. Poste ne nur la tondroj bruegis, sed ankaŭ fortaj briloj aperis — malgraŭ tio, ke daŭre estis la ĉielo sennuba.

Tiele estis ĝis la mateno de la sekva tago. Kaj antaŭtagmeze ni rimarkis apud nia kabano Peĉjon, la filon de la lama Adalberto. Haste li vokis al ni: „Knaboj, venu! Venu al la vilaĝo! Soldatoj iras!“

Kune kun panjo, ni iris do triope — mia fratino, la frato kaj mi — al la vilaĝo. Ekscitiĝo tie estis granda. Virinoj, viroj, infanoj svar-

## PLU NE MORTU LA URBOJ

*Al la 35-a datreveno de la atombombado de Hiroŝima kaj Nagasaki*

Haltis horloĝoj —  
la tempo haltis.  
Mortis du urboj  
samtage  
matene.  
Varmoradioj  
presis la nomojn  
de tiuj urboj,  
urboj—martiroj,  
sur la memoron  
de la terглоbo.  
Eĉ en la sonĝo  
oni ne rajtas  
ilin forgesi!  
Brulas skarlate  
en homa memoro  
nomoj-avertoj  
de Hiroŝima,  
de Nagasaki.  
Sangas la vundoj  
de la hibakŝo\* —

ĉies doloro  
kaj ĉies  
malgloro. . .  
Sed ve!  
Ne ĉiuj tion konscias.

Svebas tra l'mondo  
nova minaco  
de l'pli terura,  
de l'pli moderna  
horora morto —  
neŭtrona bombo.  
Iuj ŝajnigas ĝin  
eĉ „humana“!  
„Tute ne gravas —  
asertas ili, —  
ke terdekono  
spertos la sorton  
de Hiroŝima  
kaj Nagasaki. . .  
Tamen restontoj  
nepre bonfartos!“  
Kie, homaĉoj?!  
Ĉu en infero,  
en kosma polvo?  
Cetere,  
se vi jam

tiel humanas,  
kial ne pretas vi  
vin  
dediĉi al tia sorto —  
al la pereco? . . .

Ne resaniĝas  
vundoj hibakŝaj,  
ili avertas,  
alvokas homaron:  
„Homoj de l'tero,  
la veraj homoj!  
Haltu,  
pripensu,

haltigu,  
katenu la manojn  
de mizantropoj,  
ĵetontaj bombojn!  
Savu la Teron,  
la vivon savu!

Vladimiro Pacjurko

\*hibakŝo — atombombito, kiu restis vivi.

(Ukraina SSR)



mis, krietadis, gestadis vigle. Kaj poste aperis en la malproksimo iu grize verda serpento, kiu malrapide moviĝis pli kaj pli proksimiĝante al la vilaĝo. Iom post iom, la serpento ŝanĝiĝis en senfinan homan kolonon. Tio estis soldatoj. Sed ne tiaj, kiajn ni timis. Ankaŭ ne tiaj, kiel la soldato, kiu venis al nia kabano kaj pro kiu panjo ĝojis, kaj ankaŭ ploris.

„Pola armeo! La niaj!“ — jen kaj jen ni aŭdis tiajn ekkriojn inter la vilaĝanoj. Multaj kamparaninoj ploris, aliaj ĵetis florojn al la soldatoj. Viroj kaj knaboj elportis sitelojn da malvarma akvo, kiun avide kaj haste trinkis la soldatoj, elsaltante por momento el la vico. Kaj en iu momento ĉiuj vilaĝanoj komencis kanti. Tio okazis samtempe, kvankam ni ne rimarkis, ke iu alvokis al kantado. „Ankoraŭ Pollando ne pereis dum ni vivas!“ — tekstis la vortoj de la kanto. Ni konis ĝin. Panjo instruis ĝin al ni, sed severe malpermesis kanti ekster la hejmo. Nun ŝi, la aliaj salutantoj, kaj ankaŭ ni — kantis ĝin ĉe la vojo. Do — ekster la hejmo. Ne ĉion ni komprenis, sed ni sentis, ke nun okazas io grava, tre grava kaj solena. Kaj ankaŭ la soldatoj kantis kaj ridetis al ni, kvankam ili aspektis tre lacaj kaj ni vidis, ke ili ŝvitegas.

Kaj poste iu soldato sur ĉevalo haltis ĉe ni kaj demandis min, ĉu mi eble volus iomete rajdi. Tio estis por mi kvazaŭ fulmotondro. Ĉar la ĉevalo havis sur la dorso veran selon. Mi jam antaŭe sciis rampi de sur barilo al la dorso de la ĉevalo de nia mastro, sed tiu ĉevalo neniam surhavis selon. Plena de ĝojo, preskaŭ kreviganta min, kun la helpo de la soldato mi ekŝidis sur la selo. Li diris al mi: „Rajdu ĝis tiu monteto kaj reen. Ne plu for, ĉar la ĉevalo estas ankaŭ laca“. Kaj mi rajdis, kiel estis ordonite. Mi sentis min esti ege grava kaj mi vidis la enviajn rigardojn de la kamaradoj de miaj in-

fanaj ludoj, kiujn ili ĵetis al mi, kiam mi rajdis sur vera selo.

Kaj poste panjo diris, ke ni revenos hejmen, al Lublin. Kiam ni proksimiĝis al la urbo, en luita kamparana ĉaro, jen kaj jen oni povis vidi ankoraŭ glimantajn kabanajn, profundajn spurojn de iuj gigantaj raŭpoj, kavojn plenajn de akvo, ĉevalajn kadavrojn, kiuj tre fetoris kaj al kiuj ne rigardi ordonis panjo. Kaj jen de la periferioj de la urbo oni sentis haladzon, fumon, fetoron kaj tre multenombre kuŝis dise homaj kaj ĉevalaj kadavroj, vunditaj, bruligitaj, kripligitaj. Panjo ordonis al ni rigardi nur al la dorso de la ĉevalo, kiu tiris nian ĉaron.

Sur la stratoj svarmis soldatoj, polaj kaj sovetaj, partizanoj, homoj civilaj. Knaboj, kiel ni, gratis en kestoĵ da municio, kaŝludis en ruinoj. Kvankam la urbo aspektis terure, oni ne vidis malĝojon sur la vizaĝoj. Kontraŭe — ekscitiĝo kaj ĝojo estis ĝuste la sentoj, kiuj sin pentris sur ĉies vizaĝoj.

Kaj poste ni vidis, kiel homaj grupetoj ekstaras antaŭ aŝiĝoj kaj legas. Tion ni jam konis el la jaroj, kiam la germanoj estis ĉe ni. Sed tiam la vizaĝoj de la homoj estis severaj, malĝojaj, en la okuloj ili havis larmojn kaj rankorecon.

Mi jam sciis legi, do ankaŭ mi ekstaris. Mi ne komprenis ĉiujn vortojn, kvankam mi povis legi ilin, sed mi eksciis, ke Pollando estos tute liberigita, ke la grundojn ricevos la kamparanoj, la bankoj kaj fabrikoj apartenos al la nacio, kaj en Pollando estos justeco kaj egaleco. Tion mi komprenis.

Nun mia filino havas preskaŭ tiom da jaroj, kiom mi tiam. Ŝi ankoraŭ ne scias, ke tio, kion mi legis tiam — estas vero. Por ŝi julio estas monato de ferioj. Kaj tiel estas bone.

#### Gloso

*Rankoreco* — vengêma resento

## Poemo pri la patro

### Vladimiro Pacjurko

Kiam la suno finas ruĝigi la ĉielrandon, ie elpost la malproksimaj bluaj montoj elrampas la vespero. Malrapide, sed decidoplene ĝi kovras per siaj veluraj manteloj arbojn kaj domojn. Malaperas la lastaj sunradioj, kvazaŭ memorigante, ke venis jam la tempo por ripozi.

Tiumomente ankaŭ mia ĉambro pleniĝas per mallumo. Okupinte la angulon, ĝi transsaltas

de objekto al objekto iom nerapidante, ĝis en la ĉambro fariĝas tute nevideble. La objektoj cedas al ĝi facile, preskaŭ senreziste. Kaj nur la malnova violono, pendanta super la lito, venkas en la duelo kun la mallumo. Jen, ĉirkaŭis ĝin la mallumo ĉiuflanke, kaj ŝajnas, ke ĝi tuj ĝin sufokos, sed la elfrotita, kun malgranda breĉo sontabulo ankoraŭ longe rebrilos en la obskuro.

La lunradioj donas forton al la violono. Ĝi suspiras jam pli facile, streĉas la lacajn kordojn — kaj en la odorplena maja spaco flugas mallaŭta muziko.

Mi ne scias, kiel nomi la verkon subite kunplektigantan el lirikaj kaj maltrankviligaj, severaj kaj solenaj sonoj. Eble tio estas sonato aŭ simfonio. Eble ĝi estas grandioza uverturo al la vivo. Sed en mia koro, kiu elrevis kaj ĝuas ĝin jam multajn jarojn, tiu ĉi muziko nomiĝas poemo pri la patro. . .



— Kiu instruis vin ludi, paĉjo? Kiel trafis en viajn manojn tiu ĉi violono, — demandas mi lin. Li silente rigardas min antaŭ ol eliri el la portreta kadro. Poste li ridetas i el printempvarme, ekskuas brave la blondajn harojn kaj okulumas direkte al la violono: jen, petu, ke ĝi rakontu al vi: Kaj ĉi tiu rakontas, elverŝas ĝojon kaj ĉagrenon per sorĉaj sonoj. . .

Ho juneco, flama kapo! Kie nur oni ne aŭdis la violonon. En edziĝfestoj kaj amuzvesperoj, en labortagoj kaj festoj vigle kaj facile dancetis la arĉo sur la sonoraj kordoj. Multaj paroj da botoj disŝiriĝis en la vortico de ĝiaj rondancoj. Ĝia mastro tiel sin premadis per la vango al ĝi, ke li bruligadis ĝin per la varmega spiro. Kaj tremis la violono, kvazaŭ ĝi timus, ke pri tiu amdeklaro lia destinitino ĵaluzos kontraŭ ĝi.

Kaj kiel kantis la violono, kiam ĉe li naskiĝis filo! La mastro revenis laca el la kampo (ĉar li estis grenkulturisto), sed ne forgesis ĝin. La violono kantis, kantis feliĉe la koro de l'patro. Kaj akompanis ilin base la majskaraboj en la blanka maro de ĉerizfloroj, ridetis elsupre majestaj steloj. . .

Eksilentis la violono. Embarasita aŭ eĉ ofendita. Pro kio tuŝi la pasintecon? Ĉu necesas sangigi malnovajn vundojn?

. . . Neniel ĝi povis kompreni, kien malaperis la mastro. Kaj nur surdiga bombeksplodo proksime, pro kiu krevis la sontabulo, kaj parolbruo de fremda lingvo penetranta tra la frakasitaj vitroj, komprenigis, ke okazis io timiga kaj nekorektebla.

Ne, ĝi ne ofendiĝis je li.

Ĝi komprenis: dum nigraj rampuloj kun svastikoj ne estos plene distretitaj, sonos nek ĝi, nek la aliaj violonoj. Kaj li, ne nur bona, sed ankaŭ forta kaj kolera pro malamo, venkos la invadintojn, revenos al ĝi. . .

Kvar printempoj forflugis de la disiĝtago. Kvietiĝis la brulegoj, malaperis la fumo. Denove floris la ĉerizujoj kaj la pomarboj. La violono atendis. Avide ĝi kaptis ĉiun brueton. Kaj jen eksonis ies paŝoj en la antaŭĉambro. Li, certe li!

Ĝi ne kuraĝis rigardi en la karteton, kiun la leterportisto etendis al la patrino. Pro akra krio, eliginta el ŝia brusto, ĝi divenis ĉion. . .

En mallaŭta minoro lamentas la violono. Estas aŭdeble kiel malantaŭ la fenestro, en la ĝardeno, ŝvelas kaj krevas burĝonoj. Jam kio-man fojon la tero submetos sian vizaĝon al la majaj pluvoj. Juniĝas la tero. Kaj en mia ĉambro sonas poemo. La poemo pri l' patroj, kiuj ne revenis el la milito.

Bohuslav Boroviĉka

## EN LANG-SON

### POST UNU JARO

Postsignoj de la ĉina agreso estas ankoraŭ videhlaj

Vespere antaŭ forveturo mi denove trafolumis la notlibron kun notoj faritaj dum la lasta jaro. Jes, la dato preskaŭ koincidas — la 13-an de marto, precize antaŭ jaro mi dum ĉi tiuj tagoj duafoje dum tri semajnoj vizitis la nordvjetnaman urbon Lang-son, kelkajn tagojn post retiriĝo de la ĉinaj invadintoj. Kiel aspektas ĉi tiuj lokoj post unu jaro? Pri tio mi meditis, kiam nia aŭtomobilo frumatene forlasis Hanojon por veturi norden sur ŝoseo numero unu.

Kvankam estis ankoraŭ tre frue, ni vidis sur la ŝoseo viglan trafikon, en kiu dominis antaŭ ĉio multaj biciklistoj. Baldaŭ komenciĝos matena laboro en la fabrikoj kaj gelaboristoj kutime kun malgrandaj kaseroloj en retsaketoj pendigitaj sur la direktiloj rapidis al la laborejoj. Sed ankaŭ sur la kampoj, kiujn ni preterveturis, la labortago komenciĝis evidente kun tagiĝo. Virinoj starantaj ĝisgenue en akvo elprenis rizplantetojn kaj ligis ilin en malgrandajn fasketojn. Aliaj helpe de iu balancilo, al kiu estis alligita profunda ĉerpilo transversis akvon el malgrandaj lagetoj al akvumataj kampoj. Preskaŭ ĉie nur virinoj. Ilia sorto ne estas facila. Oni povas vidi ilin ne nur laborantaj sur la kampoj, sed ankaŭ riparantaj fervojtrakon, sur konstruejoj ili veturigas puŝveturileton kun sablo kaj mortero, matene ili portas al la bazaro en du grenkorboj pendigitaj sur bambustango nekredeblan ŝarĝon da legomoj aŭ fruktoj. En lando, kiu estis dum dekjaroj detruata de milito kaj kie fariĝis batalantoj eĉ neadoleskantoj, ne eblis fari alimaniere. Virinoj devis fari laboron de viroj, eĉ se ĝi estus la plej fortostreĉa.

Kiam ni post kelkaj dekoj da kilometroj forlasis la ebenaĵon, malmultis ankaŭ rizkampoj. Sur la deklivoj de montetoj aperis teraskametoj kun batatoj — ĉi-tieaj terpomoj — kaj manio-koplantejoj.

Diference de la malaltaĵoj, ĉi tie troviĝas proporcie malmultaj fekundaj terenoj kaj tial oni zorge prilaboras vere ĉiun kampeton. La vojo serpentis sur krutaj deklivoj kaj denove descendis al longaj mallarĝaj valoj, la trafiko maldensiĝis kaj la distancoj inter vilaĝoj pli-grandiĝis. Ĉiam pli ofte ni renkontis militveturilojn kaj marŝantajn soldatgrupojn. Ni alproksimiĝis al terzono ne rekte trafita de la lastja ĉina agreso, sed senpere minacita de ĝi. En urbeto Dong-mo, tridek kilometrojn antaŭ Lang-son, do preskaŭ kvindek kilometrojn de la landlimo troviĝis unu el la evakucentroj. Ĝiaj provizoraj loĝantoj dum kelkaj semajnoj kelkobligis la nombron da loĝantoj ĉi tie vivantaj.



La homoj post la agreso revenis siajn hejmlukojn kaj ĉi tie la vivo denove revenis al la normalo.

Sur loko de iama tendaro por rifuĝintoj nun troviĝas bazaro. La bazaro ĉi-tage ĝuste estis tenata, do ni elaŭtiĝis kaj trairis inter centoj da vendantoj, kiuj proponas por aĉeto plejparte nutraĵojn — batatojn, maniokfruktojn, rizon, legomojn, sed ankaŭ diversajn bezonaĵojn por mastrumo, fabrikaĵojn el rizpajlo kaj bambuo. Kiam oni lastaŭtune establis libervendadon de komercaĵoj, ĉiu strebas elkulturi sur sia kampeto kiom eble plej multe da terproduktoj kaj per vendado de pliaĵo pligrandigi la enspezon por sia familio.

Kiam ni iomete ripozis kaj trinkis po tason da varma teo por refreŝiĝi, ni ekveturis al la lasta etapo de nia vojaĝo. Lastjare dum nia unua vizito ni renkontis ĉi tie homamasojn da rifuĝintoj, plejmulte virinojn kun infanoj, forportantaj en korboj kaj ligsakoj al sekura loko sian plej bezonatan havaĵon. Post la montoj tondris tiam kanonoj, kaj la agresantoj proksimiĝadis iom post iom al la provincurbo. Hodiaŭ ĉi tie regas trankvilo, kiu per nenio memorigas la lastjaran agreson. Ke ne paŝis tiom longe de post kiam furiozis ĉi tie la milito, ni vidis tuj post nia alveturo en Lang-son. En la unua momento la vidaĵo, kiun montris al ni la urbo, ne diferencis multe de la lastjara: detruitaj domoj, muroj portantaj postsekvojn de pafado, bruligitaj frontonoj. Sed oni vidas unu gravan diferencon. En la urbon revenis ĝiaj loĝantoj, sur la ŝoseoj viglas la trafiko, sur la malplenaj lokoj inter detruitaj domoj estas ĝardenoj kun legomoj kaj apude zorge ordigitaj amasoj da purigitaj brikoj el ruinaĵoj. La homoj uzas ilin por ripari siajn domojn aŭ por konstrui provizorajn loĝejojn.

En la stratoj denove aperis malgrandaj vendejoj kun freŝe pentritaj tabulŝildoj. Nu, vendejo estas paradnomo por pli granda tablo, de tri flankoj ĉirkaŭita de benkoj el rabotglatigitaj lignotabuloj, sed oni povas ricevi tie ĉi bananaĵojn, spicon, kelkajn ovojn, cigaredojn, teon. La posedanto havas de ĉio malmulton, sed ĝi sufiĉas. Ja oni haltas tie ĉi ofte nur por trinki tason da teo, fumi cigaredon aŭ babili iomete.

Ni denove veturas tra la lokoj, kiujn ni ekkonis lastjare. Jen la domruinoj de la provinca komitato, kie estis pafmortigita per insidpafoj de la ĉinaj murdistoj japana komunisto kaj ĵurnalisto Isao Takanox. Jen la lernejo, kiu nelonge antaŭ sia detruo estis novkonstruita helpe de UNESKO, la industriaj entreprenoj elrabitaj kaj poste ebenigitaj kun la tero.

Ni veturas sur la ĉefstrato, kie la ĉinoj intencis okazigi triumfparadon de la „venkintaj trupoj“, sed antaŭ ol oni povis okazigi ĝin, ili estis devigitaj retiriĝi.

Post mallonga halto en la provinca urbo ni forveturas el Lang-son nordorienten al Dong-dang, urbeto troviĝanta apud ĉina landlimo. La zigzaga ŝoseo kelkfoje transpasis fervojtrakon

gvidantan tra Dong-dang al la montpasejo Huunghi, iam bone konata kiel Pordego de la amikeco. Sed nun tiu ĉi montpasejo estas enirejo en lupkuŝejon, de kie lastjare la malamiko invadis Vjetnamion. La fervojo portas freŝajn postsignojn de riparoj en la lokoj, kie lastjare el la detruita digo elstaris reloj. Simile aspektas ankaŭ la ŝoseo, sur kiu ni veturas. Oni devas adopti la rapidecon al ĝia stato. La batpremita tero kaj ŝtonaro, per kiu oni plenigis kraterojn post malamikaj minoj, en iuj lokoj enfalis kaj nia „Volgo“-aŭtomobilo ofte sentas tion.

Ni preterpasis la vojmontrilon kun gvidsigno „Dong-dang — 9 km“. Ĉi tie ni lastjare elaŭtiĝis, ĉar la ŝoseo estis ankoraŭ subminita kaj la reston de la vojo al la apudlima urbeto ni trairis piede. Ĝi okazis nur du tagojn post la retiriĝo de la ĉinaj trupoj en tempo, kiam sur la deklivoj de la altaj montoj tondris pafado, kaj tra la ĉirkaŭa teritorio ĉirkaŭvagis grupoj da ĉinaj banditoj. Nuntempe regas ĉi tie trankvilo, sed ne senzorga kaj indiferenta. Oni sentas en ĝi ankoraŭ daŭrantan streĉitecon. La homoj, kiujn ni dumvoje renkontas, portas sur unu ŝultro pafilon, sur la alia pioĉon. Armiulojn ni vidas apogitaj en ĉiu agro, sur kiu laboras la vjetnamaj terkulturistoj. La montdeklivoj estas ĉirkaŭzonitaj per tranĉeoj, kies parapetoj ne estas ankoraŭ surkreskitaj de herbo. Survoje ni, same kiel antaŭ Lang-son renkontas militveturilojn kaj marŝantajn trupojn. Ili devas esti ĉi tie por malebligi provon pri nova agresatako, per kiu oni ne ĉesas minaci de la kontraŭa flanko de la limo.

La hodiaŭa posttagmezo ankaŭ ĉi tie estas trankvila, sed ne ĉiam estas same. Sur la vjetnaman teritorion penetras grupoj da armitaj murdistoj, falas ĉi tien artileriaj obusoj elpafataj post la limontoj.

La barilo, kiu haltigis nin lastjare naŭ kilometrojn antaŭ Dang-dong, staras ĉiufoje kelkajn centojn da metroj post ĝiaj unuaj stratoj. Sel la oficiro de la gardposteno estas pli severa ol tiu, kiun ni lastjare persvadis permesi al ni iri plu. „Ne koleru, sed vi vere ne povas plu iri. Tie estas jam nur militeritorio. Vi vidus la samon kiel lastjare. Dume ne estis tempo rekonstrui la urbon, kaj kiu scias, eble ĝi estus vana laboro“ — li montris per la mano al la ne tro malproksima monto, kie turniĝas radaroj de ĉina observejo. „Tie post la montoj oni havas preparitan tutan armeon por denove agresi nin.“

Ni ĉesis insisti. La oficiro estas tie ĉi por plenumi la ordonojn. Ni fotis la urbeton sub alta kruta rokmuo kaj reveturis. Kvankam la ĉina agreso finiĝis antaŭ unu jaro, ĝiaj postsekvoj restas kaj daŭros longe, ĝis oni tute forigos ilin, ĝis la sunlumo grizigos la blankajn tomboŝtonojn sur la novaj tombejoj, ĝis el la ruinaĵoj denove elkreskos la urboj.

El la ĉeĥa  
Jindřich Tomíšek



# Ekumena

## VOCO DE PACO

**ĈSSR.** En la ĉefurbo Praha okazis en la tagoj de 5a — 6a de februaro 1980 la II-a tutlanda kongreso de la Unuiĝo de Katolikaj Ekleziuloj en ĈSSR „pacem in terris“, kiu festis jam 30-jaran jubileon de sia fondiĝo. Al 6 meritplenaj membroj de tiu ĉi Unuiĝo estis transdonitaj medaloj de la Monda Packonssilantaro.

Konsidere al la nuna pli streĉita internacia situacio estis decidite intensigi la ĝisnunan porpacan aktivadon en spirito de la encikliko de papo Johano XXIII-a „Pacem in terris“ — kies titolon la Unuiĝo akceptis kiel sian nomon — kaj precipe ankaŭ pliprofundigi la porpacan kunlaboron kun internaciaj pacorganizaĵoj.

En la fina Proklamo estas formulitaj la ĉefaj taskoj por la estonta laboro: zorgi por konservo de la paco, kontribui al mildigo de la internacia streĉiĝo kaj plibonigo de la reciprokaj rilatoj inter ĉiuj popoloj. La programo de plua pacaktivado estis grandparte inspirita per urĝaj porpacaj alvokoj de papo Johano Paŭlo la II-a, faritaj pasintjare dum liaj vizitoj en la naziisma koncentrejo en la pola urbo Osviencim kaj en la ĝenerala sesio de la Unuiĝintaj Nacioj.

En la ĉefurbo Praha okazis je la 6a — 7a de februaro, lige kun la kongreso „Pacem in terris“, la V-a konsultiĝa renkontiĝo de reprezentantoj de la Berlina konferenco de eŭropaj katolikoj (BK) kaj de Kristana packonferenco (KPK).

Kun zorgo estis konstatite, ke la procedo de la internacia malstreĉo estas nuntempe grave minacata. Tial la fina komuniko interalie instigas ĉiujn kristanojn kontribui por venki la nunan krizan situacion per celkonscia porpaca aktivado.

**Britio.** La Brita Konsilantaro de la anglikanaj ekleziuloj rifuzis moralan subtenon al la brita registaro en la problemoj de nuklea armado. Ĝi instigis la registaron unuflanke rezigni la renovigon de propra memstara atakpotencialo, kiam malmalmoderniĝos la ĝisnunaj atomaj submarŝipoj. Tiamaniere la anglikana eklezio avertas reagis al la intenco de la brita registro modernigi 4 submarŝipojn per raketoj Polaris.

**Jordanio.** En la ĉefurbo Amman kunsidis episkopoj el Sirio, Libano, Jordanio, Irako, Kuvejt, Federacio de Arabaj Emirlandoj, Somalio, Sudano, eĉ Egiptio. El tiu ĉi kunveno ili komune alvokis kristanojn kaj islamanojn al paca solvado de ĉiuj problemoj, vivo en frateco, amo al prok-

simuloj kaj reciproka, ĉiuflanka prospera kunlaboro.

**Salvadoro.** La San-Salvadora ĉefepiskopo Oscar Arnulfo Romero dum multaj jaroj aktivis por intereso de malriĉuloj kaj kontraŭ nerespektado de elementaj homaj rajtoj en la lando. Tiaĉeleli utiligadis ĉiujn taŭgajn okazojn, precipe siajn dimanĉajn predikojn en la San-Salvadora katedralo, eĉ funebrajn paroladojn dum enterigo de la murdigitaj patriotoj. Li skribis eĉ personan leteron al prezidento de Usono Karter, postulante, ke la registaro de Usono ne plu donu financan kaj armean helpon al la salvadora registaro, ĉar tiu ĉi estus uzita kontraŭ la veraj interesoj de la popolo.

Konsekvence de tiu ĉi agado li lastatempe ricevadis avertajn leterojn, ke lia vivo estas endanĝerigita. Sed la voĉo de lia konscienco estis tiel forta, ke li ne povis silenti pri maljustaĵoj okazantaj en lia vivmedio kaj tial plue, senkompromise daŭrigis sian aktivadon. Pro sia persista defendo de homaj rajtoj, li estis en jaro 1979 proponita por Nobel-pacpremio. Sed alian „rekompencan“ li subite ricevis: la 24-an de marto 1980 — dum celebrado de Diservo en la San-Salvadora preĝejo — li estis pafmortigita de grupo de maskitaj banditoj.

La historio envicigos lin inter la martiroj batalantoj por homaj rajtoj. Sed tio ne sufiĉas. Li devas fariĝi brilanta gvidstelo, prilumanta unu el la ĝustaj vojoj al justa estonteco de ĉiuj popoloj. La forto de lia konscienco veku kaj plifortigu la konsciencan de ĉiuj homoj por harmoniigi la vivon en ĉies vivmedioj kaj krei kondiĉojn por efektivigo de nova, justa ekonomia kaj sociala ordo — premiso por paca kunlaborado de ĉiuj nacioj!

**ĈSSR.** En la ĉefurbo Praha okazis la 19. 02. 1980 ĝenerala kunsido de Regiona Grupiĝo de la Kristana Packonferenco, kiun partoprenis 120 teologoj de kristanaj ekleziuloj kaj societoj. La fina komuniko akcentas la gravecon de porpaca aktivado de ekleziuloj kaj kredantoj, esprimante esperon, ke per kuniĝo de ĉiuj internaciaj porpacaj fortoj la tutmonda paco estos sekurigita.

**Vatikano.** Gazeto „L' osservatore romano“ publikigis principan artikolon kun titolo „Pacienca verko de pacedukado“ kaj supertitolo „Kontraŭ atsonomisumaj armadelspezoj“. Enkonduke ĝi konstatas, ke disvastiĝo de atomarmiloj, kiuj nuntempe posedas eĉ multajn malgrandajn ŝtatojn, ŝanĝos nian terglobon en danĝeran deponejon.

Ĝi akcentas neceson paciense edukadi ĉiujn homojn al paco, interaie ankaŭ per malsekretigo de raportoj pri kresko de tutmonda armado, eĉ pri diversaj fikomercoj de armilfabrikantoj, kiuj ekz. tute nemorale ofertas „facile manipuleblajn armilojn — 800 pafojn dumminute...“ ktp.

Tio havas nenion komunan kun sekureco aŭ defendo, sed estas plene malmorala „komerco per morto“, kiun oni devas efike kontraŭstari. Urĝe bezone estas konvinki ĉiujn kompetentulojn ne freneze disĵetadi astronomiajn sumojn por



armado, sed racie uzi ilin por plibonigo de la vivnivelo de la tuta homaro!

**Hindio.** En urbo Dilli okazis 3-a konferenco de UNO por industria evoluo (ONUDI). Reprezentanto de Vatikano mons. Luciano Storero kritikis nesufiĉan kunordigon en la preparlaboroj por nova internacia ekonomia ordo kaj instigis ĉiujn ŝtatojn pli iniciate kaj pli efike kontribui al pli rapida venko de diferencoj inter riĉaj kaj malriĉaj landoj. Plue li deklaris, ke armado estas grava obstaklo de iu ajn progreso kaj konkludis: „La homaro devas fari konsciajn, kuraĝajn decidojn prospere al progreso kaj tutmonda paco“.

**Brazilo.** En urbo Itaiĉi, ŝtato Sao Paŭlo kunsidis 200 brazilaj episkopoj, kiuj eldonis dokumenton kontraŭ kapitalisma alproprigo de la grundo, subtenantan penon de agrikulturaj laboristoj je justa agrara reformo. Ĝi rezultigis vivan intereson de kamparanoj, sed nekonsenton de brazilaj oficialaj rondoj.

**Eŭropo.** La Mondkonsilantaro de Eklezioj, kuniganta 295 kristanajn ekleziojn, kiuj havas en 100 landoj de la mondo pli ol 350 milionojn da kredantoj, instigis siajn membro-ekleziojn kaj la tutmondan publikan opinion intensigi la penojn en jenaj direktoj:

— por plifortigo de paco kaj mildigo de la internacia streĉiĝo;

— kontraŭ reveno de la malnova milito;

— kontraŭ dislokigo de novaj nukleaj armiloj en Okcidenta Eŭropo;

— por ratifo de la kontrakto SALT 2

**Usono.** La fama evangelisto B. Graham interŝanĝis leterojn kun la prezidanto de la Kristana Packonferenco kaj kun la hungara episkopo D-ro K. Tóth. En ĝi li proklamis, ke la unuaranga, publike morala devo de la eklezioj konsistas en efika kontraŭstaro al la freneza armadkonkurado kaj peno pri konservado de paco, en kiu la kristanoj devas kunlabori kun ĉiuj homoj, tute egale ĉu kredantoj aŭ nekredantoj.

**USONO.** La ĝenerala sekretario de la nordamerika katolika episkopa konferenco mons. Thomas Kelly proklamis en Vaŝingtono: „Rajto je laboro ne estas pli malgranda ol aliaj homaj rajtoj. Kreon de sufiĉa nombro da laborlokoj por ĉiuj usonanoj ne eblas prokrasti, ĉar tio signifus malrespekton al nerezignebla homa rajto.“

Okaze de la datreveno de murdo de pastoro Martin Luther King li denove kondamnis rasismon, lastatempe konstante plifortigantan en Usono. La amerika rasismo estas direktita ne nur kontraŭ nigruloj, sed ankaŭ kontraŭ loĝantoj de indiana, hispana kaj azia devenoj.

**Gvatemalo.** „Se vi volas pacon, laboru por justeco“ estas la titolo de la deklaro de 16 gvatemalaj episkopoj, akcentanta, ke ilia patro bezonas pacon kaj unuecon por povi solvi gravajn ekonomiajn kaj socialajn problemojn.

J. K.

Gloso

*Pacem in terris* — Paco sur la tero

## La monumento

„Ні ченням  
forgesos“

La monumento estas instalita en vilaĝo Mihajlovka, regiono de Dnepropetrovsk en Soveta Ukrainio. Skulptisto — G. N. Krapivko.

La monumento montras tragikan epizodon de la dua mondmilito. Kiel rakontas ĉilokaj loĝantoj, la infanoj de diversaj aĝoj kaj nacioj, estis en infan-domo, kiam faŝistoj ilin...

Oni diris al la infanoj, ke oni ilin translokas en alian lokon. Ĉilokaj loĝantoj vidis kiel faŝistoj kondukis la infanojn. La infanoj iris kun siaj pakaĵoj, gardataj de faŝistoj kun pafiloj kaj hundoj.

Kiam ekster la vilaĝo komenĉigis pafado, la vilaĝanoj divenis, ke oni pafmortigas la infanojn, kaj ĵetis sin por helpi al la infanoj, sed la faŝistoj baris la vojon. Multaj vilaĝanoj vidis kiel faŝistoj tuŝpafis la infanojn kaj duonvivajn enterigis.

La ĉeestantoj rakontas: dum longa tempo oni aŭdis animŝirantajn kriojn kaj ĝemojn.

La skulptisto diris: Vidi mortigitajn sur batalkampo — estas kutime por soldato, tamen vidi buĉejon de infanoj — tiun ĉi teruraĵon oni ne povas pirakonti.

K. Istomin

### Legantoj skribas:

Ni prezentas ekstrakton el letero de sveda pacamiko:

Estonte la militrisko pligrandiĝos kaj estos danĝere vivi en Eŭropo, se Usono rajtos starigi mez-vojo-raketojn.

Atente mi sekvas la informojn en gazetoj kaj televido. Mi demandas min, ĉu Usono preparas militon kontraŭ Sovetio kaj la aliaj orientaj ŝtatoj en Eŭropo, aŭ ĉu Usono nur provas malkuraĝigi la orientajn ŝtatojn. Laŭ mi tio estas vana entrepreno, ĉar Sovetio estas forta nacio kaj ne timas Usonon.

Svedio estas neŭtrala lando kaj ne povas permesi traflugon de NATO-raketoj.

Ĝi deziras bonajn rilatojn kun Sovetio kaj aliaj orient-blokaj ŝtatoj. Mi ne povas imagi, ke la sveda laboristaro kaj tiu en la aliaj okcidentaj landoj deziras esti viktimoj en eventuala nuklea milito. Mi kun vi kun ĝojo notas, ke Nederlando, Belgio kaj Danlando protestis kaj provas malrapidigi la decidon pri raketoj.

Se ĉiam la imperiistoj daŭrigos la armadon, daŭrigos eltrovi pli kaj pli terurajn nukleoarmilojn, tiam estiĝos vere danĝera situacio. Nedezirinda milito nuklea super Eŭropo okazigos morton al centoj da milionoj da homoj, detruos nian Eŭropan kulturon.

Mi bedaŭras, ke Usono ne volas akcepti la proponon de Breĵnev malarmi Eŭropon. Sovetio montris sian bonan volon kaj retiris trupojn el Mezeŭropo. Kontraŭ la Soveta bonvolo Usono emas starigi novajn armilojn. Estas bedaŭrinda fakto.

Ni socialistoj kaj esperantistoj devas pli forte uzi niajn eblecojn labori kaj batali por PACO, por SOCIALISMO kaj por MONDO de HOMEKO.

Via sveda kamarado

Egon Göransson (Svedio)



## KAMPUĈIO

La nigraj jaroj, de Vu Kan — Hoang Nguyên — 15 cm 156 p. ilustr. — Eldonis Periodaĵo "Vjetnama Kuriero" kaj Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio—Hanojo 1979.

— Vero pri 30 jaroj de Vjetnamo-ĉinaj rilatoj — Blanka libro de Vjetnama Ministerio pri eksterlandaj aferoj.

Mendeblaj ĉe Bulgara, Hungara, Franca, Japana MEM sekcioj. Mendu tuj tiujn librojn je subtena prezo por helpi vjetnamajn pacamikojn, revigligi E-eldonadon.

## LA NIGRAJ JAROJ

Dum pluraj jaroj ni ne plu ricevis esperantlingvajn librojn el Vjetnamio. Estas facile kompreni ke la rekonstruado de la lando post tiom da rui-negoj, kaj la neceso defendi ĝin kontraŭ la ĉina minaco ne permesis tuj eldoni en Esperanto. Novan li bron en la lingvo internacia, en lando ankoraŭ tiom suferanta pro siaj teruraj vundoj, oni emas konsideri kiel miraklon. Kaj vere la miraklo okazis! Krome, ni povis atendi ke tiu unua libro pritraktos esence vjetnamajn problemojn, kiuj certe ne mankas. Nu, ne! Aperis verko pri Kampuĉio, la lando kie la Polpota neofaŝismo, telegvidata el Pekino, ekstermis 40% de la tuta loĝantaro per metodoj eĉ

pli barbaraj ol tiuj de Hitler. „Kamaradoj, vi jam akiris mirindajn sukcesojn. Per unu fojo vi likvidis tutan socian klason“, diris Maŭ Zedong en Junio 1975 al Pol Pot. . .“

Profesiuloj de antikomunismo sendube dirus, ke tia libro celas pravigi la vjetnaman „invadon“. La nombro de viktimoj por ili ne gravas, eĉ se la tuta popolo de Kampuĉio devis, sen tio, pere! Sed mi trovis eĉ ne unu aludon pri tio, kion ni devas honeste nomi vjetnama helpo kaj liberigo. Sajnas al mi ke la elekto de la temo „Kampuĉio“ por la unua libro de certe nova serio estas simbolo de la frataj sentoj kaj de la internaciismo, kiuj animas la vjetnaman popolon. Al Vjetnamio ankoraŭ mankas multe. Al Kampuĉio mankas preskaŭ ĉio.

La unua gesto, la unua penso iras al la pli marliĉa najbaro!

„Kampuĉio“ estas la titolo de tiu 154-paĝa libro konsistanta el 2 esencaj partoj: „La nigraj jaroj“ kaj la proceso de Pnompeno, kiu faris terure detalan akuzakton. Aŭtoroj estas VU KHAN, ĵurnalisto-esperantisto, kaj HOANG NGUYEN, juristo. Eldonis „VJETNAMA KURIERO“ kaj VJETNAMA PACDEFENDA ESPERANTISTA ASOCIO kune, en Septembro 1979. Belega ekzemplo de Esperanto en la servo de la homrajtoj!

Aktivuloj kaj bone informitaj homoj trovos en tiu libro konfirmon de tio, kion ili jam scias. Sed sendube ili trovos pli multe! Unuflanke ili legos multajn faktojn ne de ĉiuj konatajn. Fari kompletan bilancon de tiu dramego ne estas eble: la dimensioj de la krimo ne estas mezureblaj. Sed „Kampuĉio“ liveras atestojn, kiuj montras plej diversajn aspektojn de la evento. Aliflanke vi trovos klarigojn pri la motivoj de la Polpota kliko. Ja necesas kompreni kiel povas naskiĝi tiaj monstraĵoj se ni volas eviti ilian ripetigon aliloke.

La tuta esperantistaro havas tie okazon informiĝi pri la evento alimaniere ol per sia ĉiutaga gazeto, radio aŭ televido, kiuj ne ĉie raportis honeste pri la infero travivita de la kampučia popolo kaj pri ĝiaj kaŭzoj. Diskonigi tiun libron certe estas grava kontribuo al la manifestiĝo de la vero kaj, konsekvence, al la firmigo de la paco en tiu mondregiono.

W. G

## UKRAINA ESPERANTISTA ASOCIO

La 29-an de januaro 1980 estis fondita Ukraina Respublika Filio de Asocio de Sovetaj Esperantistoj (URF ASE).

La fonda konferencon partoprenis ĉ. 50 delegitoj de ukrainiaj E-klubo en 15 loĝlokoj de la respubliko. La konferencon partoprenis la prezidanto de ASE doktoro de filologio profesoro M. I. Isajev.

La konferencanoj detale pridiskutis la staton kaj problemojn de la E-movado en la respubliko kaj signis ĉefajn labordirektojn de la fonda ASE-Filio. Estis elektitaj gvidorganoj de URF ASE. Prezidanto estas docentino E. V. Majburova.

La Filio efektive laboras per E-klubo de Ukrainio, kaj funkcias sub patronado de la Ukraina Societo de Amikeco, kaj Kulturaj Rilatoj kun Eksterlando, kaj kun helpo de la respublikaj sindikataj kaj junularaj organizaĵoj.

## ESPERANTO-LERNADO

Kiel samtempe oni povas eklerni la lingvon — aŭ ĝin praktiki? Kaj ĉio ĉi en internacia etoso. La plej taŭga rimedo, kiu ebligas efektivecon de tiu programo, estas partopreno en studperiodo en Grésillon, la franca esperantista kulturdomo.

En 1980, ĝi okazos de la 22-a de julio ĝis la 11-a de aŭgusto.

La kursoj organiziĝas laŭ niveloj: por komencantoj, por progresantoj I kaj II. Ĉiuj kursoj laŭeble okazos

plene en la internacia lingvo, eĉ la unua grado, dank' al la tiel alloga rekta metodo, gvidata de s-ino A. Childs Mee, el Britujo.

La dua grado celas kompletigi lingvokononjn, kaj samtempe glatigi la ofte malfacilan transpason al praktika uzo. Venontan someron s-ro R. Lloancy el Francujo gvidos tiun kurson.

La tria nivelo organizas la lernadon por ke oni iagrade konsci pri la esencaj ecoj de la lingvo; ĝi estos animata de s-ro A. Ribot.

Aliflanke, tiuj kiuj ne intencas sekvi tiujn kursojn, havos la eblecon malkovri la literaturajn kvalitojn de la lingvo per studado de taskoj proponataj de s-ro A. R. Mollison el Britujo.

La diversaj kursoj okazas matene, dum minimume du horoj. Je la fino de la posttagmezo, la kursanoj denove kolektiĝas por praktiki en konversacio la antaŭe akiritajn kononjn.

Estas notinde, ke la unuaj horoj de la posttagmezo ebligas partoprenon en unu el la diversaj manaktivadoj: bindarto, korbofarado, perlotredado, aŭ libera senaktivado.

Pluraj ekskursoj al la apudaj vidindaĵoj en la ĉirilate riĉa regiono povas esti organizitaj, ĉu kolektive, ĉu proprainciate.

Por informoj kaj aliĝoj, skribu al Esperantista Kulturdomo, Kastelo Grésillon, 49150 BUGE Francio.





La ĉefoj de la malvarma milito sin kaŝas malantaŭ la ekranego de „Afganistana problemo“

## korespondemuloj

### Bulgario

Al Bulgario, 4400 Pazarĝik, str. „Gurko“ 3-a, E-societo RADIO por ekspozicio okaze de 70 jara jubileo oni sendu: librojn, afiŝojn, gazetojn en E-to, bildkartojn, bele afrankitajn leterojn, insignojn, flagetojn ktp.

1303 Sofio, bul. „Ĥr. Botev“ 97, Mariana Elenova pri ĉt.

1303 Sofio, bul. „Ĥr. Botev“ 97, Kalinka Vasileva pri ĉt. CSSR

M. Veloch, Nuselská 4, 140 00 PRAHA 4-26 j. pri kino, interŝ. librojn, bildkartojn.

### Hispanio

Junulo 21-jara per JK: Miguel San Segundo, Apartado 2056 Sabadell (Barcelona)

### Hungario

40-j. inĝeniero, interes. pri vojaĝoj, reciprokaj vizitoj, ekskursoj. Serĉas korespondantojn por la klubanoj. — Zonai József, KISKUNHALAS, Allomás u. 2. H-6400

H-3300 EGER, Arany J. u. 12/a  
Istvan Kadar, maŝ. inĝeniero, edziĝinta 39 j., pm, foto  
H-3300 EGER, Baktaí u. H/2-1/4

s-ino Gaborne Kovacs, oficistino, edziniĝinta 30 j, pĉt  
H-3300 EGER, Remenyik Zs. 14

Bertalan OROSZ, maŝ. inĝeniero, edziĝinta 43 j. pm, vojaĝoj

H-3300 EGER, Kallomalom u. 58

Jozef Mate, maŝ. inĝeniero edziĝinta 33 j. sportoj, turismo

H-3300 EGER. Albert F. u. 6

Sandor Turi, maŝ. inĝeniero, edziĝinta 37 j. pĉt, horloĝoj

H-3304 EGER 1. lkt 8/c

f-ŭlo Benedek Jozsef Sandor aŭtomontisto 23 j. diskoj, turismo

H-3300 EGER, Lenin u. 101

Laszlo Erdei 34 j. edziĝinta pĉt, turismo

H-3304 EGER, 1. lkt. 8/c.

Jozsef Sandor maŝ. teknikisto 49 j edziĝinta pĉt. turismo

H-3300 EGER, Kodaly Z. u. 24 11/2

s-ino Zoltanne Jaszkuti oficistino 47 j. pĉt, hundoj, muziko.

H-3304 EGER, 1. lkt. 5-B/5

f-ŭlo Laszlo PRUTZ 21 j. elektrikmuntisto pĉt, diskomuz.

H-3304 EGER, 1. lkt. 7

Istvan Molnar 47 j. edziĝinta pĉt, sportoj

H-3300 EGER, Kossuth L. u. 22

f-ino Katalin Angyal 27 j. literaturo, turismo

H-3300 EGER, Szovjet hads. u. 7

Zoltan Orosz 28 j. edziĝinta , maŝ. teknikisto pĉt, sportoj

H-3304 EGER 1. lkt 7-B/1

f-ŭlo Zoltan Szabo, ŝoforo 22 j. aŭtosporto kaj turismo

H-3300 EGER, Kertalja u. 34/a

f-ŭlo Laszlo Szilagyi tornisto 26 j pĉt

### USSR

Viktor Rjabinin, USSR, 257022, u. Ĉerkaso, str. Tols-togo, 46-17, 27-jara inĝeniero: kolektas anekdotojn, ŝercaĵojn, humoraĵojn, ridindajn desegnojn nur en Esperanto.

Nadja Kojevnikova, 11/r. d. 4 kv .24, 404123 Volĵskij 22.jara pionirgvidanto, deziras koresp. pri ĉiuj temoj. interŝ. bildkartojn

Valentina Kisil, 257028, u. Ĉerkaso str. Luksemburg, 185/1—52, interesiĝas pri politikaj kantoj.

Eduard Raus, 200021 Tallin 21, Poŝtrestante, 62 jara konstruisto e-isto de 1930 j. MEM reprezentanto por Estonio-pri MEM spertoj; politiko, ĉiutageco. Kolektas reproduktaĵojn de famaj pentraĵoj.

630004, Novosibirsk, str. Vokzalnaja magistral 5, kv.279  
Juravlev Igorj 18 j. kun gejunuloj el Okcidenta Eŭropo pri muziko, literaturo, turismo, kinoarto.

630028, Novosibirsk-28, str. Vilujskaja 32, kv. 92  
Bender Jurij, 18 j. ĉt.

63099 Novosibirsk, Urba E-klubo, abonkesto 213, ĉt. ĉl.  
630099 Novosibirsk, str. Miĉurina 43, kv 17

Toporkova Larisa, muzikistino en infanĝardeno, kun Pollando, Bulgario ĉt.

630099 Novosibirsk, str. Sovetskaja 26, kv. 28  
Nikitenko Boris Leonidoviĉ 18 j.

Perma Esperanto-klubo serĉas kontaktojn kun eksterlandaj E-klubo.

Skribu al Aleksandr Mikiŝev, str. Kustanajskaja 17—16, 614056, PERM.

Por fari letervesperon E-klubo petas sendi al ĝi salutleterojn, bildkartojn ktp. Ĉiu sendinto ricevos respondon. Skribu al Aleksandr Mikiŝev, str. Kustanajskaja 17—16, SU-614056, PERM.

Aleksandr Ivanov, 644066, str Krasnij Putj, d 139 “A”, 10ĝ. 24 I, ĉt. Respondo certa



**REDAKTA KOMITATO****Violin Oljanov** (Bulgario) — ĉefredaktoro**Nikola Aleksiev** (Bulgario)**D-ro Detlev Blanke** (GDR)**André Cherpillod** (Francio)**William Gilbert** (Francio)**Oldrich Knichal** (CSSR)**Kimiaki Kurita** (Japanio)**Nguyen Hac Trung** (Vjetnamio)**Boleslaw Staszczak** (Pollando)Lingva revizio: **Asen Grigorov** (Bulgario)Arta aranĝo: **Kiril Draĵev** (Bulgario)

La redakcio atendas kontribuadojn de pacamikoj el la tuta mondo. Ju pli da kunlaborantoj, des pli varia kaj interesa revuo. Sendu la materialojn prefere tajpitaj aŭ tre klare mane skribitaj kun interlinia spaco kaj margeno, sur grandaj folioj de kancelaria formato. La redakcio akceptas nur originalan (unu)ekzempleron de la tajpaĵo. Kopioj estas lasataj sen konsidero. Skribu tre klare viajn nomojn kaj adresojn en nacia lingvo! La redakcio ne resendadas neuzitajn materialojn.

**KIEN SKRIBI****Honora prezidanto:** Nikola Aleksiev, str. Nezabavka 1, vhod 2, 1113 SOFIA, Bulgario.**Prezidanto:** D-ro Pethes Imre, H-1940, BUDAPEST VI Népköztársaság útja 73, Hungario.**Vicprezidantoj:** D-ro Magomet Isaev, prosp. Kalinina 14, MOSKVA K-9 USSR.

Glady Claude, 21 rue Kessels, B-1030 BRUSSEL, Belgio.

**Generala sekretario:** William Gilbert, 30, rue Croix-Montoire, 37100 TOURS, Francio.**Sekretarioj:** Syozi Nanba, Huruiti 3-13-26, Zyôto-ku, OSAKA, Japanio.

Iuĝ. Angel Todorov, bulv. Emil Markov, blok 37, II, 1404 SOFIA, Bulgario.

**Ĉefredaktoro:** Violin Oljanov, str. Bojanski Vodopad 241E, 1404 SOFIA, Bulgario.**Centra administrantino:** Vasja Petrova, Bulgara MEM-KOMITATO, bulv. Hristo Botev 97, 1303 SOFIA, Bulgario.**Centra kasisto** (por la okcidentaj landoj): Pierre Jouvin, 14 rue Thiers, 76120 GRAND QUEVILLY, Francio (Poŝtkonto CCR — Rouen 102-45 P.).**Respondeculo pri landaj numeroj de „PACO“:** Helmut Fuchs, Hohe Str. 33, DR-83, PIRNA, Germana DR.**KIE ABONI?****Aŭstralio:** N. A. Collier, 7 Monomeeth St. BUDERIM Qld, 4556.**Aŭstrio:** Ernesto Quietensky, Pappenheimgasse 70/3/12, A-1200 WIEN AŭS. 100. —**Belgio:** Glady Claude, 21 Rue Kessels, 1030 BRUSSEL.  
**Britio:** Paul Hewitt, Laycroft, Main Road, COVENHA M, Louth, Lincs, LN11, OPF. £1 —**Bulgario:** Bulgara MEM-KOMITATO, bulv. Hristo Botev 97, 1303 SOFIA 3 levoj.**Ĉeĥoslovakio:** Ĉeĥa Esperanto-Asocio, MEM-Sekcio, Jilaska 10, 110 00 PRAHA I 30 kronoj.**Danlando:** Egon Starup, Brovaenget 26, DK-2700-KOBENHAVN BRH. 35 d. kr.**F. R. Germanio:** Roland H. Hegen, Iggelbach, Schlossgasse 30, D-6731 ELMSTEIN 20 DM.**Finnlando:** Erkki Järvinen, Ukonkivenpolku 2-1-68, 01610 VANTAA 61. 30 fin. m.**Francio:** Roger Degrelle, 11 Cours Léopold, 54042 NANCY—CEDEX (pĝk. 771.77R) 40 fr. fr.**Germana Demokratia Respubliko:** Centra Laborrondo Esperanto en la Kulturligo de GDR, Charlottenstr. 60 108 BERLIN 10 DM.**Hispanio:** Luis Serrano Perez, Font Nova 32, SABADELL (Barcelona).**Hungario:** Hungara MEM-KOMITATO, H-1368 BUDAPEST 5, pf. 193 36 forintoj**Italio:** Riccardo Pinori, V, le Ghisleri 9/15, I-00176 ROMA (p. ĝ. k. 64882004).**Japanio:** Kurita Kimiaki, 411 Misimi, Yata Sakura-gaoka 1209—98 (Japana Pacdefenda Esperantista Asocio).**Kubo:** Rufino López, Havana Esp.-Rondo, Poŝtkesto 314, HABANA I.**Norvegio:** Olaf Reiersol, Buerstad, N-3135 TOROD.**Pollando:** RUCH — WARSZAWA.**Portugaliao:** Portugala E-Asocio, Rua Dr. João Couto 6, R/C A-LISBOA 350 escudo.**Rumanio:** Cosma Dorin, Muzicescu 26, sc.C, ap. II, R-1900 TIMIȘOARA.**Socialisma Respubliko Vjetnamio:** Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio, 107 Quan Thanh, HANOJ.**Sovetunio:** Unuiĝo de sovetaj societoj pri amikecaj kaj kulturaj rilatoj kun aliaj landoj, prosp. Kalinina 14, MOSKVA K-9 1,80 rubloj.**Usono:** Bern Wheel, 834 Wenonah Ave, Oak Park, IL 60 304 dol. 6,50**Aliaj landoj:** Bv. turni vin al unu el la ĉi-supraj adresoj aŭ al Pierre Jouvin (centra kasisto — vd. maldekstre).**GRAVE!**

Abonpagojn el socialismaj landoj sendu al 1303 SOFIA, bulv. Hristo Botev 97 (por „Paco“). El nesocialismaj landoj — al la adreso de la Centra kasisto — 40 fr. fr.